*Aliroj al esperanto* (2018), pp. 9–24

# Pacisma aliro

Javier Alcalde

## 1. Enkonduko

Meze de la deknaŭa jarcento, en Bjalistoko, oftis streĉiĝoj inter diversaj etnaj grupoj. Verŝajne estis la hebrea loĝantaro kiu plej suferis. Tiam, juna idealisto kuraĝis elpensi neperfortan ilon por fronti tiajn situaciojn, kaj loke, kaj internacie: neŭtralan kaj facile lerneblan lingvon, kiu apartenu al neniu. Pro tio, ĝi povus aparteni al ĉiuj. La juda okulkuracisto Lazaro Markoviĉ Zamenhof prezentis sian projekton de internacia helplingvo en 1887.

Tiu motiviga aspekto por la kreo de Esperanto ne estas anekdoto, sed esenca kaj nedisigebla parto de la lingvo kaj de la socia movado kunliganta ĝiajn subtenantojn. Ĝia nomo mem enhavas la homisman esperon de ĝia kreanto pacigi mondon eterne militantan. Temas pri interna ideo de la lingvo, preskaŭ spirita. Jen ŝlosila diferenco inter la zamenhofa propono kaj centoj da similaj lingvo-projektoj, kiuj neniam atingis ĝian disvastigon.

En tiu ĉi teksto ni analizos la Esperanto-movadon el pacisma perspektivo. Unue, ni situigos Esperanton en la historio de pacismo. Poste, ni pritraktos la rilaton inter Esperanto kaj la paca movado ambaŭflanke. Koncerne la pacajn esperantistojn ni fokusiĝos pri la agado de konkreta asocio, nome Internacia Societo Esperantista por la Paco. Aliflanke, pere de la kandidatoj al Nobelpremio pri paco ni esploros tiujn pacistojn interesitajn en la movado por internacia helplingvo. Fine, ni analizos la evoluon kaj de pacismo, kaj de esperantismo, ekde la unua mondmilito ĝis la nuntempo. Ni argumentos ke la hodiaŭaj celoj de UEA kaj aliaj esperantaj organizaĵoj kompreneblas ene de la moderna paradigmo de pozitiva paco.

## 2. Pacismo

La termino *pacismo*[1] estis unuafoje uzita en 1901,[2] kvankam eblas trovi tiun ideon ekde la komenco de la registrita homa historio en ĉiuj kulturoj. Anglo-

[1] En tiu ĉi teksto *pacismo* kaj *pacifismo* estas uzataj kiel sinonimoj, same kiel *paca movado* kaj *pacisma movado*.

[2] La 15-an Augusto 1901 Émile Arnaud proponis la vorton *pacifismo* (*pacifisme* en la franca) por kunigi ĉiujn homojn, ideologiojn kaj movadojn kun paca sinteno, kaj doni al ili similan gravecon al tiu, kiu tiam havis aliajn sociajn movadojn, kiel socialismon kaj inismon. Anekdote, Giraud (2007) mencias konversacion tiusence inter Arnaud, Henri La

amerika pacismo kontraŭstaras militon kaj aliajn perfortojn per kombinaĵo de persona nepartopreno en milito kaj uzado de neperfortaj rimedoj por solvi konflikton. El eŭropa perspektivo, pacismo inkluzivas la klopodojn atingi internacian pacon kaj reciprokan komprenon. Ĝi esprimiĝas per socia movado aŭ kiel specifa ideologio, kaj baziĝas sur moralaj, religiaj aŭ pragmataj principoj. Racie, pacistoj konscias pri la kostoj de milito kaj perforto. Sekve ili preferas solvi aŭ transformi konfliktojn alimaniere.

En tiu kunteksto eblas loki la zamenhofan etikon en eŭropa perspektivo celanta atingi internacian pacon kaj reciprokan komprenon. Tiusence, Esperanto estas komunikilo kapabla mildigi etnajn (kaj ne nur) konfliktojn. Krome, simile al paca movado, ankaŭ la subteno de la internacia helplingvo fare de esperantistoj baziĝas sur moralaj, religiaj kaj pragmataj principoj. Tiu ligo inter Esperanto kaj pacismo aparte videblas en la unuaj jardekoj de la lingvo. Ne hazarde temis pri la momento kiam kreiĝis la moderna paca movado, inkluzive de ties konferencoj, premioj kaj asocioj el pluraj tendencoj. Interalie menciindas internacia politika agado, pacaj popolaj grupoj kaj ankaŭ oficialaj klopodoj el jura perspektivo.

En la dua duono de la deknaŭa jarcento aperis nacie[3] la unuaj pacaj societoj.[4] En 1889 fondiĝis Interparlamenta Unio (france *Union interparlementaire*). Samjare okazis en Parizo la unua Universala Kongreso de la Paco (france *Congrès universel de la paix*), evento kiu ripetiĝos 33 fojojn ĝis 1939.[5] Dum la tria el tiuj kongresoj, en 1891 en Romo, fondiĝis Internacia Oficejo de la Paco (france *Bureau international de la paix*, angle *International Peace Bureau, IPB*),[6] kiu fariĝis la centro de internacia popola movado. Krome en 1899 kaj en 1907 okazis du packonferencoj en Hago, kiuj kunigis la elementojn pli oficialajn de la movado. Kiel vidote, ĝis la unua mondmilito la Nobel-premio pri paco honoris preskaŭ senescepte homojn kiuj rilatas al tiuj pacismaj tendencoj.

Fontaine, Gaston Moch kaj aliaj en Septembro 1901 dum vojaĝo per tramo al Glasgow por partopreni en la 10-a Universala Kongreso de la Paco. Oni ankaŭ scias, ke Alfred Fried kaj Bertha Von Suttner estis inter la fruaj subtenantoj kaj uzantoj de tiu termino. Kiel vidote, tiuj ĉiuj homoj ligiĝas diversmaniere al Esperanto.

[3] Rilate al lokaj societoj, Nilsson (1926:7–8) mencias tiun de Nov-Jorko, fonditan en 1815, alian en Londono en 1816 kaj trian en Ĝenevo en 1830.

[4] Indas memorigi, ke en 1879 naskiĝis Volapuko. Temas pri la unua planlingvo kiu sukcesis kunligi siajn subtenantojn en internacia movado.

[5] Krom tiuj porpacaj mondkongresoj, Nilsson (1926:13) rimarkigas antaŭajn kunvenojn en 1843 en Londono, 1848 en Bruselo, 1849 en Parizo, 1850 Frankfurto ĉe Majno kaj Londono en 1851.

[6] Je la komenco la nomo de tiu asocio enhavis ankaŭ la vorton *Konstanta* (france *permanente*, angle *Permanent*), kiu poste perdiĝis. Ĝia sidejo lokiĝis en Berno.

## 3. Pacisma esperanta agado

La rilaton inter Esperanto kaj pacismo klarigas jene la aŭstro Otto Simon en la Enciklopedio de Esperanto (1933).[7] "Estas nature", li diras, "ĉar Zamenhof mem estis ekstrema pacifisto". Tial kompreneblas la ofta apero de pacaj ideoj en naciaj esperantaj broŝuroj kaj la pacismaj paroladoj en internaciaj kongresoj de Esperanto. Ekzemploj multas tiusence, ekde la emfazaj vortoj de la urbestroj de Folkestone, Dover kaj Calais dum la kongreso de Bulonjo ĉe maro en 1905, ĝis la granda parto de la programo, kiu rilatis al pacaj aferoj en la esperantaj kunvenoj de Berno 1913 kaj Parizo 1914. Siaflanke, la debatoj en universalaj kongresoj pri paco plurfoje inkludis la temon de internacia helplingvo ekde la unuan fojon okazinta en Parizo en 1899. Krome, en la revuoj de tiutempaj pacaj asocioj aperis regule informoj prie.

Tamen, laŭ Simon, la unua esperantisto kiu sisteme uzis la internacian lingvon por pacismaj celoj estis la franco Gaston Moch (1859–1935). Militisto ĝis 1894, li dediĉis ekde tiam plurajn jarojn de sia vivo al pacismo. Inter 1896 kaj 1913 li partoprenis en ĉiuj universalaj kongresoj pri paco. Aparte li ĉefrolis kiel organizanto en tiuj de 1900 en Parizo kaj de 1902 en Monako. En 1903 princo Alberto I de Monako kreis Internacian Instituton de la Paco (france *Institut international de la paix*), prezidatan de Moch. Tiu ĉi ankaŭ prezidis la Konstantan Delegacion de la Francaj Pacaj Asocioj (france *Délégation permanente des sociétés françaises de la paix*). Ankaŭ menciindas, ke li publike subtenis sian samlernejanon Alfred Dreyfus dum la tiel nomata Dreyfus-afero.

Gaston Moch fariĝis esperantisto en 1899 kaj tuj partoprenis en esperantaj grupoj. En 1900 li fondis kaj prezidis en Parizo lokan Esperanto-asocion. Tiel, li aktivis samtempe, kaj en la paca movado, kaj en la Esperanto-movado, klopodante ligi ambaŭ movadojn.[8] Unuflanke, li (kaj liaj samideanoj) celis propagandi pacismon pere de Esperanto. Aliflanke, uzante la internacian helplingvon oni ankaŭ klopodis plibonigi la internacian kunordigadon kaj kunlaboradon de pacaj grupoj.

En Aprilo de 1905 Moch fondis Internacian Societon Esperantistan por la Paco, kiu fariĝis turnopunkto por la pacista esperantismo. Al ĝi aliĝis elstaraj figuroj de la Esperanto-movado, inkluzive de Hector Hodler, Carlo Bourlet, Théophile Cart, Antoni Grabowski, Marie Hankel, Edmond Privat kaj Henri Valienne.[9] Inter Julio de 1905 kaj Decembro de 1908 tiu asocio

[7] Pri Otto Simon, vidu Simon (2008), citita en Tuider (2017).

[8] Tamen, li poste fariĝos idisto kaj en la 1930-aj jaroj eĉ rifuzis ĝenerale la ideon de planlingvo.

[9] Vidu Moch (1906:45–53), citita en Tuider (2016a). Aparte substrekindas Hector Hodler kaj Edmond Privat. Unuflanke, ĉar ambaŭ verkos plurajn tekstojn pri pacismo kaj neperforto. Aliflanke, ĉar ili fondos Universalan Esperanton-Asocion en 1908. Tiel, ne nur

eldonis 42 numerojn de sia bulteno Espero Pacifista kaj 14 tradukojn de gravaj pacistaj verkoj en kolekto nomita Libraro Pacifisma. Inter la publikigitaj aŭtoroj troviĝas Henri Dunant, Elie Ducommun, Octave Mirbeau, Charles Richet, Frédéric Passy, Andrew Carnegie, Gaston Moch, Paul d'Estournelles de Constant, Alfred Fried kaj Otto Umfrid. Ni priparolos kelkajn el ili en la posta sekcio de tiu ĉi ĉapitro.

Inter 1905 kaj 1908 Internacia Societo Esperantista por la Paco kunvenis en la kadro de ĉiu internacia kongreso de Esperanto (tio estas, Bulonjo ĉe maro, Ĝenevo, Kembriĝo kaj Dresdeno), sed ĝiaj ĝeneralaj kongresoj okazis ene de la universalaj kongresoj pri paco. Tiel, la unua okazis en Septembro de 1905 dum la Universala Kongreso de la Paco en Lucerno. Moch fariĝis prezidanto, la pastro Friedrich Schneeberger[10] sekretario kaj Zamenhof honora prezidanto. Poste, la dua okazis dum la pacisma kongreso en Milano kaj la tria en Munkeno en 1907.

La gravecon de la asocio montras la forta kresko de ĝia membraro dum la unuaj monatoj:

*Kresko de la membraro de Internacia Societo Esperantista por la Paco*

| *Dato* | *Evento* | *Kvanto da homoj* |
|---|---|---|
| Aprilo 1905 | Unua konveno de la asocio | 16 |
| Julio 1905 | Kunveno dum UK | 39 |
| Aŭgusto 1905 | Abonantoj de la revuo | 124 |
| 1906 | Membraro de la asocio | 295 |

Fonto: Otto Simon, "Pacifismo" en Enciklopedio de Esperanto (1933).

El esperanta vidpunkto tiu kongreso en Munkeno estis la plej sukcesa. Post pluraj jaroj de studoj kaj debatoj, la partoprenantoj fine esprimis la deziron ke Esperanto estu instruata en la lernejoj kiel internacia helplingvo, kaj komisiis la Internacian Oficejon de la Paco konigi tiun deziron al la registaroj. Krom tio, la kongreso decidis, ke ekde la sekvanta kunsidaro Esperanto povas esti uzata en kunsidoj. Tiam ŝajnis ke la pacismaj esperantistoj atingis etan finan venkon, kaj eblis imagi pli brilan estontecon tiurilate.

Post kelkaj monatoj, tamen, Internacia Societo Esperantista por la Paco ne plu aktivis.[11] La disputoj pri lingvaj aferoj kaj pri la organizado de la

Zamenhof estis elkora pacisto, sed tiel estis ankaŭ kelkaj el la plej gravaj gvidantoj de la tiutempa Esperanto-movado.

[10]Schneeberger estis sviso kaj ĉefrolis en la tiutempa Esperanto-movado. Li prezidis la duan Universalan Kongreson en Ĝenevo en 1906 kaj multe aktivis en la esperanta stenografio. Li ankaŭ kunredaktis la periodaĵojn *Tra la Mondo* kaj *La Revuo*. Poste li fariĝis idisto.

[11]Tamen, ioma aktivado por paco ene de la Esperanto-movado daŭros en la sekvaj jaroj.

Esperanto-movado ne helpis asocion, kiu ĉiam devis alfronti malfortan financan situacion. Krome, la Ido-skismo influis plurajn gvidantojn, kiuj forlasis la movadon. Unu el ili estis la pacista motoro Gaston Moch, alia la sekretario de la asocio, Friedrich Schneeberger. Ekstere, la mondo prepariĝis por nova kaj granda milito, kaj en tiu kunteksto ne nur Esperanto, sed ĉiu pacisma movado suferis. Pripensante la esperantan pacisman agadon en tiu ĉi periodo, Simon konkludis jene: "Moch povis konstati, ke estis pli da pacifistoj inter la Esperantistoj ol Esperantistoj inter la pacifistoj" (Simon 1933). Malfacilas nun argumenti kontraŭ tiu aserto; verŝajne Moch kaj Simon pravis. Indas memorigi telegramon senditan de estonta Nobel-premiito pri paco Alfred Fried, kiu partoprenis kiel ĵurnalisto la pac-konferencon de Hago en 1907. El tie li sendis jenan tekston al la samtempe okazinta Universala Kongreso de Esperanto en Kembriĝo: "El la falsa Pac-Konferenco mi salutas la veran Pac-Konferencon". Tiurilate, atenta esploro de la Nobel-premiitoj pri paco ĝis la unua mondmilito montros diversajn rilatojn inter multaj figuroj kaj la movado por internacia helplingvo. Alivorte, eĉ se estis pli da pacistoj inter la esperantistoj ol esperantistoj inter la pacistoj, indas valorigi la duajn, kiuj ja efikis, kaj kvante kaj kvalite.

## 4. Nobel-premio pri paco

Ekzistas centoj da premioj pri paco en la mondo. Inter ili la plej grava sendube estas la Nobel-premio. Kvankam en ĝia historio kelkaj el la gajnintoj estis polemikaj (kaj eĉ kritikataj el pacisma perspektivo), dum la unuaj jaroj la aljuĝanta komitato fidele respektis la deziron de Alfred Nobel. Sekve, la unuaj premiitoj estas preskaŭ senescepte homoj kiuj ĉefrolis en la asocioj de la paca movado, foje pli oficiale kaj foje pli popole. Aldone, pluraj el ili rilatis diversmaniere al la movado por internacia helplingvo. Ni pritraktos kelkajn ekzemplojn.

La unuaj kungajnintoj en 1901 estis la fondinto de Internacia Ruĝa Kruco, Henry Dunant, kaj la fondinto de la unua internacia pac-societo, en Francio, Frédéric Passy. La ligoj inter Ruĝa Kruco kaj Esperanto estas konataj, ĉefe dum la mondmilitoj.[12] Pri Passy, interese estas, ke li subtenis Volapukon

Ekzemple, la programo de la planita 10-a Universala Kongreso okazunta en Parizo en 1914 enhavis 'Fakan Kongreson de Pacifistoj', honore prezidota de Charles Richet (jam Nobel-premiito pri medicino) kaj loke organizota de f-ino Denamur kaj s-roj Wieting, Raguier, Lebreton, Brossier kaj Bourreau. Inter la raportontoj aperis ankaŭ s-roj Louis kaj Chavet. La tuta kunsida semajno antaŭvidis debatojn pri ribelismaj rimedoj, haltigo de armadoj, malpligrandigo de armadoj, forigo de armadoj, arbitracio, diversaj projektoj de federacio, bojkotado ekonomia, militistaro internacia, proponoj pri Tria Haga Konferenco kaj ĝenerala kunveno de societo "Paco per Esperanto".

[12]Vidu Rodríguez (1996) kaj Lavarenne (2012). Poste, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco premiiĝos trifoje: en 1917, 1944 kaj 1963.

(Garvía 2015:35). Poste, en 1902 premiiĝis kune Elie Ducommun, unua direktoro de Internacia Oficejo de la Paco kaj amiko de la esperantisto Felix Moscheles (vidu Alihusain 2014), kaj Albert Gobat, ĝenerala sekretario de Interparlamenta Unio. Gobat ankaŭ interesiĝis pri internacia helplingvo, favorante Idon (Künzli s.j.). En 1903 venkis William Randal Cremer, fondinto de Internacia Ligo pri Arbitracio.[13] Anekdote, en 1958 tiu ligo daŭrigos sian laboron kiel parto de Mondcivitana Respubliko, asocio kreita kun tiu nomo origine en Esperanto.

En 1904 premiiĝis Instituto de Internacia Juro (france *Institut de droit international*). Unu el la fondintoj de tiu institucio estis Gustave Moynier, kies filo Adolphe partoprenis en la 4-a UK en Dresdeno dum la somero de 1908. Kiel oficiala reprezentanto de Internacia Ruĝa Kruco li ĉeestis eksperimenton de ekzerca flegado de diverslingvaj vunditoj. Poste, en 1905, Bertha von Suttner estis la unua virino kiu gajnis la Nobel-premion pri paco. Fakte, estis ŝi kiu konvinkis Alfred Nobel por krei tiun ĉi premion: "Informu min, konvinku min, kaj tiam mi faros ion grandan por la [paca] movado", li diris al ŝi.[14] Kvankam ŝi mem ne parolis la lingvon, ŝi favoris ĝin.[15] En tio eble efikis ŝia amikeco kun konata esperantisto kaj pacisto, Alfred Fried.[16]

En 1906 premiiĝis Theodore Roosevelt, usona prezidanto. Du jarojn poste li konatiĝos kun Edmond Privat, okaze de vojaĝo de Privat al Usono por propagandi Esperanton (Becker 2010:66). En tiu 1908, kungajnis la Nobel-premion pri paco Klas Pontus Arnoldson, fondinto de Sveda Asocio por Paco kaj Arbitracio, kaj Fredrik Bajer, fondinto de Dana Unio por Paco. Mencindas, ke Bajer parolis favore al Esperanto en sia prelego de akceptado de la premio. Kaj ankaŭ la sekvan jaron aperis la temo de internacia helplingvo rilate al Nobel-premiito. Temas pri Wilhelm Ostwald, amiko de Bertha von Sutter kaj ano de la germana asocio pri paco (Chickering 2015). Li konsideris militon kiel la plej teruran perdon de energio (Wall 1948:9). Ostwald premiiĝis en 1909 en la fako kemio. Aktiva esperantisto inter 1901 kaj 1907, li tamen donacis duonon de la mono gajnita el la Nobel-premio al la Ido-movado. Poste li proponos *Weltdeutsch*, internacian lingvon surbaze de la germana.

En 1911 denove du homoj kundividis la premion pri paco: Tobias Asser, iniciatinto de Konferencoj pri Internacia Privata Juro en Hago, kaj Alfred

[13] Frédéric Passy kaj William Randal Cremer estis ankaŭ la fondintoj de Interparlamenta Unio en 1899.

[14] Pri Bertha von Suttner kaj Alfred Nobel vidu Abrams (2005).

[15] Laŭ Bernhard Tuider, kiu multe verkis pri la rilatoj inter Alfred Fried kaj Bertha von Suttner, ŝi decidis ne lerni Esperanton, ĉar ŝi jam scipovis plurajn lingvojn kaj pro tio konsideris, ke ŝi ne bezonas ĝin (Bernhard Tuider, persona komuniko 2017-10-15). Vidu ankaŭ Tuider (2016b:169–170).

[16] Pri Bertha von Suttner kaj Alfred Fried vidu Tuider (2010).

Fried, fondinto de pacisma revuo *La Pacgardanto* (germane *Die Friedenswarte*). Kiel dirite, Fried aktivis en la Esperanto-movado. Li verkis lernolibron kaj ankaŭ vortaron germanan-esperantan. En 1912 premiiĝis la usona politikisto Elihu Root, iniciatinto de pluraj interkonsentoj pri arbitracio. Samjare, Root prezidis la naŭan internacian konferencon de Internacia Ruĝa Kruco, kie la franca delegacio proponis Esperanton kiel oficialan lingvon de tiu asocio (Korff 1912). En 1913 la gajninto de la Nobel-premio pri paco estis la belga juristo kaj politikisto Henri La Fontaine, kiu estis membro de la Belga Ligo Esperantista. Du jarojn poste premiiĝis alia pacisto, kiu subtenis Esperanton, sed ĉi-foje en la fako literaturo. En sia decido la aljuĝinta komitato substrekis interalie lian idealismon. Temas pri Romain Rolland, bona amiko de Edmond Privat. En 1922 Rolland akceptos la honoran prezidantecon de la dua kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

## 5. Kandidatigo de Zamenhof

Zamenhof mem estis kandidato al la Nobel-premio pri paco ok fojojn, inkluzive de sia mortojaro. En 1907 li estis subtenita de 12 britaj parlamentanoj. En 1909, 1913, 1914, 1915, 1917 kandidatigis lin Felix Moscheles, alia grava esperantisto kaj pacisto.[17] En 1913 proponis Zamenhof-on ankaŭ du ĉeĥaj profesoroj: la filozofo František Kreizl kaj la pedagogo Otakar Kádner. En 1916 la iniciatinto de Esperanto estis subtenita de la sveda parlamentano Carl Albert Lindhagen[18] en triopa propono, kiu inkludis Per Ahlberg, redaktoron de la Ido-revuo Mondo, kaj la Internacian Komitaton de Virinoj por Konstanta Paco, kiun prezidis Jane Addams.[19]

Tamen, estis en 1910 kiam Zamenhof havis pli da ŝancoj gajni la Nobelpremion pri paco. En tiu jaro, kandidatiĝis sen reala sukceseblo la princo Alfonso de Borbono Dampierre, la usona ekonomikisto Herbert J. Davenport, la bulgara politikisto André Liaptchew, la brita tekstila industriisto Charles Wright Macara, la ĉeĥa politika verkisto Rudolf Vrba, la ukraina grafo Michel Tyszkiewicz kaj la politika partio de junaj turkoj Unio kaj Progreso (france *Union et progrès*). Aliflanke, konataj pacistoj, kiuj kandidatiĝis tiun jaron sen multaj apogoj, estis la argentinanino Angela de Oliveira Cezar de Costa (vidu

[17] Ankaŭ Moscheles estis proponita por tiu ĉi premio (kvarfoje). Kune kun William Thomas Stead, kiu siaflanke kandidatiĝis ses fojojn, li fondis la unuan pac-societon en Britio. Kaj same kiel Alfred Fried, Stead kaj Moscheles estis esperantigitaj de la franca pacisto Gaston Moch, pri kiu ni parolis en antaŭa sekcio de tiu ĉi teksto. Vidu ankaŭ Garvía (2015:107–108).

[18] Lindhagen mem aperos ofte kiel kandidato en la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj.

[19] Lindhagen prezentis unue duopan proponon, nome Zamenhof kaj Ahlberg. Kaze ke la aljuĝanta komitato ne akceptos tiun proponon, tiam li proponas due Internacian Komitaton de Virinoj por Konstanta Paco. Poste, la prezidantino de tiu asocio, Jane Addams, premiiĝos en 1931.

Ceresole de Espinaco 2016), la serbo Milovan Milovanovitch (li tamen atingis ses subtenojn), la germano Jakob Münter, la aŭtorino en la franca Henriette Verdier Winteler de Weindeck,[20] la brito Philip James Stanhope (kvankam lin subtenis Alfred Fried), kaj la usona asocio Universala Paca Unio (angle *Universal Peace Union*).

Pli fortaj nomoj en 1910 (kelkaj el ili kandidatiĝis dum pluraj jaroj) estis kvin juristoj: la italo Pasquale Fiore, la belgo Edouard Descamps (subtenita de Alfred Fried), alia belgo Ernest Nys (li havis ses subtenojn), la brito Sir Thomas Barclay (subtenita interalie de Bertha von Suttner kaj Frédéric Passy), kaj la franco Léon Bourgeois (kiu premiiĝos en 1920). Du esperantistoj gajnontaj la Nobel-premion pri paco, kiuj ankaŭ kandidatiĝis en 1910, estis la aŭstro Alfred Fried (li havis ok subtenojn, interalie de Fredrik Bajer) kaj la belgo Henri Marie La Fontaine (subtenis lin Émile Arnaud). Dume, la germana pacisto Adolf Richter havis kvar subtenojn, interalie de Gaston Moch kaj Émile Arnaud.[21] Aliaj bonaj kandidatoj estis tri usonanoj: la naturalisto David Starr Jordan, la politikisto Richard Bartholdt kaj la financisto William McDowell. Fine, remarkindas la franca societo Asocio pri Kompara Juro (france *Société de législation comparée*), kaj la multfoja kandidato Interparlamenta Unio.

Siaflanke, Zamenhof estis proponita de 42 francaj parlamentanoj, Émile Boirac (rektoro de la universitato de Dijon), Charles Richet (gajnonto de la Nobel-medicinpremio en 1913), kvar britaj parlamentanoj (Philip Snowden, James O'Grady, George L. Roberts kaj J. Jowett), kaj de la brita orientalisto kaj arkeologo Stanley Lane-Poole. Kune temis pri solida kandidatigo, sed ne sufiĉe solida por gajni la tiujaran premion. La plej forta kandidato en 1910 estis Internacia Oficejo de la Paco, kiu kandidatiĝis ĉiujare ekde 1901 kaj fine venkis.[22] Inter multaj aliaj, ĝin subtenis Fredrik Bajer, Nils August Nilsson, Gaston Moch, Felix Moscheles, Henri La Fontaine, Charles Albert Gobat kaj Émile Arnaud. Kiel vidate temas pri gravaj homoj, kiuj apogis Esperanton (kelkaj eĉ aktivis en la Esperanto-movado), sed kiuj en 1910 — kiam ŝajne estis iom da organizado por kandidatigi Zamenhof-on — tion ne faris.

Fakte, multaj kaj diversaj estis la rilatoj inter la movado por internacia helplingvo kaj Internacia Oficejo de la Paco. Ekzemple, ok membroj de ĝia plenumkomitato ankaŭ aliĝis al Internacia Societo Esperantista por la Paco: Henri La Fontaine, Émile Arnaud, Gaston Moch, Felix Moscheles, Samuel Baart de la Faille, Alfred Fried, Charles Richet, Nils August Nilsson kaj

[20] Mi ne sukcesis trovi ŝian naciecon. Ŝi estis ano de Alianco de la Paco (france *Alliance de la paix*) kaj plurfoje en siaj Nobel-kandidatiĝoj ŝi estis subtenita de portugalaj deputitoj kaj aristokratoj. En 1904 ŝi aŭtoris *De la paix, du désarmement et de la solution du problème social.*

[21] Émile Aranud mem kandidatiĝis okfoje al Nobel-premio pri paco.

[22] Oni kandidatigos ĝin denove en la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj.

Edvard Wavrinsky (Moch 1907:257, citita en Tuider 2016a). En 1910 la prezidanto de Internacia Oficejo de la Paco estis La Fontaine kaj ĝia ĝenerala sekretario Gobat. Aldone, Fredrik Bajer estis ĝia kunfondinto kaj unua prezidanto.

Ni finos tiun ĉi sekcion per komento pri la daŭrigo de la premiitoj. En 1914 ekis la tiel nomata Granda Milito, kiu daŭros kvar longajn jarojn. Ĝi forte batis esperantismon, same kiel ĉiun alian pacan movadon. Kvankam tro malfrue, internacia publika opinio reagis al la detruo okazinta pro tiu milito. Io simila ne devus okazi denove. Konsekvence, dum la intermilita periodo la aljuĝanta komitato de la Nobel-premio pri paco elektis plurajn figurojn kiuj rilatis al Ligo de Nacioj, kaj ĝenerale al la agado celita al evito de kromaj militoj. Tamen, la dua mondmilito denove batis idealistojn favorajn al la neperforta solvado de konfliktoj. Poste, en la kunteksto de malvarma milito la komitato de la Nobel-premio honoros homojn ligitajn al organizaĵoj dediĉitaj al internacia kunlaborado, kiel Unuiĝintaj Nacioj. Koncerne la movadon por internacia helplingvo, ekde la 1950-aj jaroj estos Universala Esperanto-Asocio, kiu kandidatiĝos por la Nobel-premio pri paco (ĉefe danke al la agado de la sveda parlamentano Einar Dahl), sed tiun temon ankoraŭ malfacilas esplori nuntempe.[23]

## 6. Paca esperantismo dum la intermilita periodo

Kiel priskribite aliloke, esperantistoj alfrontis la grandan militon diversmaniere (Alcalde 2017). Unue, ili informis pri la eventoj pere de siaj periodaj publikigaĵoj, ofte (sed ne ĉiam) el pozicioj proksimaj al pacismo. Alifoje, Esperanto estis uzata de la registaroj por propagandi internacie. La plej konata ekzemplo tiurilate estas la germana Internacia Bulteno. Ankaŭ elstaris la homama agado de UEA, kiu tiam havis sian sidejon en la neŭtrala Svislando. Fine, abundis esperantistoj el diversaj tendencoj (religia, ina, scienca, militrezistanta, proleta internaciisma), kiuj aktivis en la paca movado. Kelkaj el ili estas jenaj.

Pri la religia pacismo, ni mencios Josef Metzger, fondinton de la Monda Ligo por Paco de la Blanka Kruco, internacia katolika societo kreita en 1916, kiu uzis Esperanton kiel laborlingvon. Unu jaron antaŭe fondiĝis Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libero (angle *Women's International League for Peace and Freedom*), kiu subtenis la uzadon de Esperanto por sia korespondado kaj internaciaj kunvenoj. Elstara intelektulo ne menciita en la antaŭa sekcio estas August Forel, kiu favoris kaj pacismon kaj Esperanton. La internacia lingvo diskoniĝis ankaŭ inter la militrifuzantoj, kiel Albert Škarvan, kiu

[23] La arĥivoj de la Nobel-premioj estas sekretaj dum 50 jaroj. Tio signifas, ke en 2018 ili nur konsulteblas ĝis la jaro 1968.

amikiĝis kun alia frua subtenanto de ambaŭ movadoj, Lev Tolstoj. Laste, indas rememori proletajn esperantajn figurojn, kiuj ĝisfunde favoris la pacisman idealon, kiel Lanti.

Ludoviko Zamenhof mem daŭrigis sian pacistan agadon dum la mondmilito. Publikiginte sian Deklaracion pri Homaranismo en 1913, li klopodis sensukcese okazigi homaranisman kongreson. Krome, en 1915 li eldonis sian alvokon al la diplomatoj, proponante interalie la kreon de io simila al Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo kaj ankaŭ de Eŭropa Kortumo. Li mortos du jarojn poste, sed la esperanta movado pluvivos, enhavante verŝajne ion de la ekstrema pacifismo de Zamenhof.

Post la fino de la milito okazis en Bilthoven (Nederlando) aro de konferencoj fundamentaj por la estonteco de la internacia pacismo. En ili kreiĝos tri institucioj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ ekzistas. La unua, Internacia Kunularo por Repaciĝo (angle *International Fellowship of Reconciliation*) fondiĝis el religia sinteno kaj en ĝi aktivis interalie Josef Metzger. La duan, Internacian Civilan Servon (angle *Civil Service International*; france *Service Civil International*), iniciatis Pierre Cérésole, kiu ankaŭ simpatiis al Esperanto. Tamen, estas la tria, kiu plej rilatas al movado por internacia helplingvo. Fakte, la Internacio de Militrifuzantoj (angle *War Resisters' International*) havis origine esperantan nomon *Paco*. Ĝi daŭrigos la uzadon de la internacia lingvo kiel unu el siaj laborlingvoj dum pluraj jardekoj.

Rakontas Otto Simon ke la esperantaj kongresoj estis la unuaj en kiuj la 'malamikaj' nacioj kunlaboris post la milito (Simon 1933). Tio okazis jam en la Universalaj Kongresoj de Hago en 1920 kaj Prago en 1921. Samtempe oni priparolis la temon de internacia helplingvo en la kadro de Ligo de Nacioj. Krome, en 1923 fondiĝis Universala Esperantista Pacifista Ligo, prezidata de nederlandanino Julia Isbrücker kaj poste de Einar Dahl. Tiu Ligo havis celojn similajn al tiuj de Societo Esperantista por la Paco.[24] Ankaŭ mencindas la internacia konferenco Paco per Lernejo, okazinta en Prago en 1927 de Internacia Oficejo pri Edukado (france *Bureau international d'éducation*), kiu havis sian sidejon en Svislando. Unu el ĝiaj organizantoj estis la ĉeĥa Vuk Echtner, bahaano, kiu aktivis ĉefe en esperantaj blindulaj rondoj. Alia estis Henriette Ith-Wille, sekretario de la pedagogo Pierre Bovet, kiu unue direktoris tiun Oficejon. Tamen, eĉ se almenaŭ 30 % de la tiutempa esperantistaro lernis la lingvon pro ties ligo al pacismaj valoroj (Tanquist 1927), laŭ Simon grava esperanta pacifista movado tiumomente ne ekzistis.

Poste, la dua mondmilito denove suferigis internaciismajn ideojn. Esperantistoj estis aparte persekutataj (ĉefe, sed ne nur) en diktaturoj sub malsamaj signoj. Dume, UEA denove agadis homame, kaj Esperanto estis uzata

[24]Laŭ Nilsson "la tasko de la asocio ŝajnas esti interesigi por Esperanto la pacajn batalantojn kaj por la paclaboro la esperantistaron" (1926:27).

kaj instruata en malliberoj kaj koncentrejoj. Samideanoj solidare subtenis aliajn samideanojn en tiuj situacioj, kiel klarigas la kataluna rifuĝinto Jaume Grau en sia taglibro verkita en la francaj koncentrejoj (Grau 2017). Ekzilito pro la Hispana milito, lia malforta sanstato permesis al li supervivi terurajn kondiĉojn nur danke al la helpo de esperantistoj. Tio konfirmis al mi Eduardo Vivancos, kiu kunvivis tiam kun Grau, antaŭ sia propra ekziliĝo al Kanado (Vivancos MS). Kompreneble, Esperanto ne sukcesis eviti militojn, sed iamaniere helpis mildigi iliajn sekvojn.

## 7. De la dua mondmilito ĝis la nuntempo

La dua duono de la dudeka jarcento estas ligata al malvarma milito. Kiel sciate, malfacile la Okcidentaj landoj kunlaboris kun la Orientaj. En tiu kunteksto kreiĝis en 1953 en Aŭstrio Mondpaca Esperantista Movado, MEM, kvankam konversacioj tiusence jam ekis en Berno en la Universala Kongreso de 1947, la unua post la mondmilito (MEM 1983). MEM sukcesis aktivi por kaj per Esperanto en pluraj landoj, kaj ankaŭ havi kontaktojn kun neesperantistaj organizaĵoj, kiel Monda Packonsilio. Tamen, ĝi estis kritikata pro troa proksimeco kun kelkaj registaroj. Ĝenerale, ĝia ĉefa problemo estis, ke ĝi ne multe aktivis ekster la komunismaj landoj.

Aliflanke, por priskribi la pacan esperantismon de tiu periodo ankoraŭ utilas la tendencoj kiujn ni uzis antaŭe. Rilate al proleta internaciismo elstaras la revuo *Senŝtatano*, organo de la internacia asocio de junaj anarkiistoj, skribita nur en Esperanto kaj kun konstantaj informoj pri paca agado. Krome, ene de SAT specife kreiĝis pacisma frakcio, kiu engaĝiĝis kun la tiutempaj kampanjoj, kiel tiuj kontraŭnukleaj. Poste, ĝi ankaŭ aktivos en la pacisma agado kontraŭ aliaj armiloj, kiel kontraŭhomaj minoj en la 1990-aj jaroj aŭ grapolbomboj jardekon poste. Siaflanke, esperantaj asocioj de la grandaj religioj, kiel Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, pritraktis pacismajn temojn en siaj kunvenoj, dum Esperanto estis konkrete subtenata de pli malgrandaj religioj, kiel Bahai kaj Oomoto. Eĉ en la kontraŭmilitservaj rondoj denove disvastiĝis Esperanto. Ekzemple, la unua hispana rifuzanto Pepe Beúnza simpatias al la internacia lingvo kaj eĉ eklernis ĝin en la 1970-aj jaroj (Beúnza 2016). Kaj simile lernis (kaj instruis) Esperanton, ĉi-foje mallibereje, usona militrezistanto Bob Luitweiler, ĉefe konata kiel iniciatinto de la edukcela gastiga asocio Servas (notu la esperantan nomon).

Pacisman esencon havas ankaŭ la praktika internaciismo pri kiu parolis Hector Hodler (vidu Künzli 2013) kaj kiun esperantistoj plenumis en malsamaj historiaj momentoj, inkluzive de la poŝta perado dum la mondmilitoj fare de UEA. Alia memorinda evento okazis post la unua mondmilito, kiam tricent aŭstraj infanoj trovis rifuĝon en Hispanio danke al la perado de hispanaj kaj aŭstraj esperantistoj (vidu Cortès 2011 kaj Tuider 2017). Denove

dum la milito en Bosnio en la 1990-aj jaroj, katalunaj esperantistoj venigis dekojn da bosniaj infanoj kaj helpadis ilin en tiaj cirkonstancoj. Ankaŭ kompreniĝas tiel la esperanta agado en la brazila Bona Espero (Dobrzyński 2008; Schor 2016) aŭ pluraj iniciatoj alilande, kiel la konga Solidareco Bona Volo. Plie, Esperanto utilis kiel ilo por havigi historian lernolibron uzeblan de pluraj nacioj kun konfliktaj vidpunktoj, kiel en Koreio, Japanio kaj Ĉinio (Redaktokomitato 2005). Tiurilate menciindas ankaŭ la uzo de Esperanto kiel pontlingvo en (post)militaj kuntekstoj, kiel en Hiroŝimo kaj Nagasako aŭ en Vietnamio kaj Indoĉinio, kie la internacia lingvo ebligis al la lokaj esperantistoj informi rekte al internaciaj aktivuloj pri la situacio en siaj landoj.

Krom tia konkreta humana agado, esperantistoj jam aktivis pacisme en sia ĉiutaga kaj kultura vivo. Tiel, ne estas hazardo ke pluraj el la pintoj de la esperanta literaturo pritraktas pacon kaj militon, kiel *Kiel Akvo de l'Rivero*, *La Granda Kaldrono*, *Kroata milita noktlibro* aŭ *Poemo de Utnoa*.

Universala Esperanto-Asocio ricevis plurfoje la rekonon de UNESKO pri la esperanta kontribuo al la kompreniĝo inter la popoloj kaj al la atingo de pacaj socioj pere de kulturaj, sciencaj kaj edukaj interŝanĝoj. UNESKO diras en la enkonduko de sia fonda dokumento ke paco komenciĝas en la mensoj de homoj. Kaj tie agas la zamenhofa propono. Pere de personaj kontaktoj, preter la oficialaj kanaloj de komunikado kaj preter abstraktaj deklaroj de internacia kunlaboro. Homoj kun homoj. Jen la paca aliro al Esperanto.

Pripensante la historion de la paca movado oni observas evoluon. Origine la klopodoj por antaŭenigi pacon ligiĝis al la esenco de la grandaj religioj. Poste, ili pliampleksiĝis por inkludi aliajn gravajn defiojn de la homaro, kiel homajn rajtojn, la danĝeron de la nuklea minaco, la rilaton de paco kun disvolviĝo kaj kun ekologio. Simile, la kompreno de paco evoluis de simple negativa ideo (t.e. foresto de milito) al pli pozitiva koncepto, kiu enhavas la kondiĉojn de digno kaj socia justeco por ĉiu homo. Sekve, kolektiva agado pere de kampanjoj, retoj kaj movadoj fokusiĝas lastatempe pri unu aŭ alia el ĉi tiuj temoj nun ligataj al paco.

Eblas identigi similan evoluon en la Esperanto-movado kaj en la kompreno de ĝiaj valoroj. Kongrue kun la tiutempa signifo de paco, ĝia frua idearo celis helpi al la foresto de milito. Ĉar unu de ties ĉefaj kaŭzoj estas la lingvaj (kaj religiaj) miskomprenoj, Zamenhof proponis ilon tiurilate. Poste, ankaŭ la esperantistoj plivalorigis la ideon de justeco. Sekve, prezentiĝas Esperanto inter la rimedoj por solvi la problemojn de lingva maljusteco.[25] Kompreneble, ambaŭ ideoj estas kunligitaj, same kiel negativa kaj pozitiva paco. Ekzemple, mi mem argumentis (kiel multaj aliaj), ke malbona mastrumado de lingva diverseco pere de diskriminacio povas konduki al la apero de konfliktoj kaj eĉ de perforto (Alcalde 2014). Se oni konsideras la lingvajn problemojn kune

[25] Tiurilate vidu Gazzola (2014) kaj Alcalde (2016).

kun aliaj sociaj aferoj, oni konkludas, ke la sorto de Esperanto estas ligata al la starigo de pli paca kaj justa internacia ordo.

## 8. Konklude

La etika kaj tutmonda projekto, en kiu Zamenhof inkludas Esperanton kiel bazan ilon de komunikado, aperis en kunteksto de imperiismaj luktoj kaj sen institucioj pri solvado de konfliktoj inter la nacioj. Tiam naskiĝis la moderna paca movado, al kiu ligiĝis nature la movado por internacia helplingvo. Kiel vidite, la komunaj aferoj inter la Esperanto-movado kaj pacismo estis oftaj kaj okazis ambaŭflanke. Unue, kaj sekvante la zamenhofajn idealojn, multaj esperantistoj interesiĝis pri pacaj aferoj el malsamaj perspektivoj. Due, pluraj gvidantoj de la ĉefaj pacaj organizaĵoj lernis la internacian lingvon kaj uzis ĝin en sia agado.

Gaston Moch estis la ŝlosila homo, kiu klopodis kunigi ambaŭ movadojn. Tamen, verŝajne pli multis la pacistoj inter la esperantistoj ol la esperantistoj inter la pacistoj. Post kvar jaroj de intensa agado, Internacia Societo Esperantista por la Paco mortis, interalie pro la Ida skismo. Nun nur eblas hipotezi pri kio okazus sen tiu divido. Ĉu tiu societo kapablus definitive ligi ambaŭ movadojn? Ĉu tiel esperantistoj el malsamaj landoj alfrontus la unuan mondmilito kiel ununura transnacia pacisma forto?

Simile, nia analizo pri la Nobel-Premioj pri paco ebligas al ni proponi duan senrespondan hipotezon. Ĉar inter ĉiuj proponintoj en 1910 estis multaj homoj kiuj rilatis diversmaniere al la Esperanto-movado, eblas argumenti, ke la kandidatigo de Zamenhof povintus esti pli forta kaj unueca. Historio, tamen, ne ŝanĝeblas, kaj denove ni nur povas demandi nin: *Kio okazus se . . . ?* Alivorte, ĉu plia kunordigo inter la subtentantoj de Esperanto plialtigus la ŝancojn de Zamenhof gajni la Nobel-premion pri paco? Interalie, tio malaltigus la ŝancojn de Internacia Oficejo de la Paco (kiel vidite, pluraj el tiuj homoj proponis ĝin). La graveco de tiu sukceso estus nekalkulebla. Unuflanke, pro tio ke la lingvo atingus konstantan kaj nedisigeblan prestiĝon. Aliflanke, ĉar tio plifortigus la rolon de la interna ideo ene de la movado. Historio ne ŝanĝeblas, sed ja indas lerni de ĝi.

Iom pli pri la historio de la Esperanto-movado ni pritraktis en la lastaj partoj de la ĉapitro. Laŭ nia argumento, kvankam la mondmilitoj profunde batis Esperanton kaj ĝiajn plej idealismajn subtenantojn, la movado tenis iun esencon, kiu rilatas al speciala praktiko de neperforto. Ja veras, ke esperantismo ŝanĝiĝis ekde la fruaj jaroj, sed ankaŭ pacismo ŝanĝiĝis. El tiu perspektivo eblas konsideri la nuntempan emfazon pri lingva justeco ene de la reganta paradigmo de pacismo, nome pozitiva paco. Tiel kompreneblas la defendo de lingvaj rajtoj, lingva demokratio, lingva diverseco, k.t.p. Celante ekvilibron

inter tradicio kaj moderneco, tiu ĉi socia movado konservis (adaptitan) la zamenhofan sintenon kaj tiel ĝi ne fariĝis likva, senenhava.

## Referencoj


Abrams, Irwin. 2005. Bertha von Suttner and the Nobel Peace Prize. Prelego farita je la simpozio Bertha von Suttner okazinta en la Kastelo Harmannsdorf en Aŭstrio, Majo 2005.

Alcalde, Javier. 2013a. Pacifism. **En:** Snow, David A.; Della Porta, Donatella; Klandermans, Bert; McAdam, Doug, red. *The Wiley-Blackwell Encyclopedia of Social and Political Movements.* Blackwell Encyclopedias in Social Sciences. Hoboken, NJ: Wiley-Blackwell.

Alcalde, Javier. 2013b. Esperanto kaj neperforto. *Global Education Magazine* **2**, 60–64.

Alcalde, Javier. 2014. Kial necesas krei indicon pri lingva justeco? *Sennaciulo*, Novembro – Decembro 2014, 27–28.

Alcalde, Javier. 2016. Naŭ demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo. **En:** Vergara, José Antonio; André, Alexandre, red. *Internacia Kongresa Universitato. 69-a sesio.* Roterdamo: UEA, pp. 33–54.

Alcalde, Javier. 2018. Pacaj klopodoj. La praktika internaciismo de Esperanto. **En:** Alcalde & Salguero, red. (2018).

Alcalde, Javier. MS. The Esperanto Movement and Pacifism in Zamenhof's time: a special relationship. **En:** Gobbo, Federico; Feierstein, Liliana R., red. *The Heritage and Legacy of Ludwik Lejzer Zamenhof Between Judaism and Esperanto.* Aperonta en Berlino: Hentrich & Hentrich.

Alcalde, Javier; Salguero, José María. 2018. *Antaŭ jarcento. Esperanto kaj la unua mondmilito.* Parizo: SAT-EFK.

Alihusain, Candice. 2014. The Peace Movement Collection and the First World War by Peter van den Dungen. Peace Palace Library 22/12/2014.

Alòs, Hèctor. 2012. *Catalan Esperantists: Pacifists in a Globalised World.* ICIP Working Papers 2012/3.

Barash, David P. 2011. *Approaches to Peace: A Reader in Peace Studies.* Dua eldono. Oksfordo: Oxford University Press.

Beúnza, Pepe. 2016. *Intervjuo por la projekto Historia Memoro de la Kataluna Paca Movado.* Barcelono: Internacia Kataluna Instituto pri Paco.

Bourrelier, Paul-Henri. 2008. Gaston Moch, polytechnicien combattant de la paix. *Les Annales des Mines – Réalités Industrielles* **3**, 48–62.

Brock, Peter. 1972. *Pacifism in Europe to 1914.* Princeton, NJ: Princeton University Press.

Brock, Peter; Young, Nigel. 1999. *Pacifism in the Twentieth Century.* Nov-Jorko, NY: Syracuse University Press.

Ceresole de Espinaco, Zunilda. 2016. La primera pacifista americana. *El Litoral*, 5/03/2016.

Chatfield, Charles; Kleidman, Robert. 1999. *The American Peace Movement: Ideals and Activism.* Nov-Jorko, NY: Twayne.

Chickering, Roger. 2015. *Imperial Germany and a World Without War: The Peace Movement and German Society, 1892–1914.* Princeton, NJ: Princeton University Press.

Clark, Howard, red. 2009. *People Power: Unarmed Resistance and Global Solidarity.* Londono: Pluto Press.

Cortès, Lurdes. 2011. Els nens austríacs acollits a Osona (1920–1923). *AUSA XXV*/167, 209–247.

Cortright, David. 2008. *Peace: A History of Movements and Ideas.* Kembriĝo: Cambridge University Press.

Dobrzyński, Roman. 2008. *Bona Espero: idealo kaj realo.* Martin, Slovakio: Stano Marček.

*Enciklopedio de Esperanto.* 1933. Ĉefredaktoro I. Ŝirjaev; redaktis L. Kökény kaj V. Bleier; la lingvofakon prizorgis K. Kalocsay. Budapeŝto: Literatura Mondo. (Represita 1979.)

Fried, Alfred H. 1907. Die hauptsächlichen Beschlüsse des XVI. Weltfriedenskongresses zu München. *Die Friedens-Warte* **9**/12, 230.

Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language.* Philadelphia, PA: University of Pennsylvania Press.

Gazzola, Michele. 2014. Lingva justeco: Kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio. **En:** Vergara, José Antonio, red. *Internacia kongresa universitato, 67-a Sesio*, pp. 74–89. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Giraud, Marielle. 2007. Pacifisme et antimilitarisme dans le mouvement espérantiste avant la première guerre mondiale. **En:** Feeley, Francis McCollum, red. 2007. *Les mouvements pacifistes américains et français, hier et aujourd'hui – Actes du colloque des 5, 6 et 7 avril 2006 à l'Université de Savoie.* Chambéry: Éditions de l'université de Savoie, pp. 211–225.

Grau, Jaume. 2017. *Tagoj kaj ruinoj.* Tradukita kaj komentita de Miguel Fernández. Madrido: SATeH.

Jakob, Hans. 1958. La help-agado de UEA 1914–1918. *Esperanto* 51, pp. 55–57.

Korff, Baron S. A. 1912. The Ninth International Red Cross Conference. *The American Journal of International Law* **6**/4, 858–864.

Künzli, Andreas. 2013. Milito kaj paco laŭ Hector Hodler. Trovebla ĉe `https://www.e-d-e.org/IMG/pdf/Hodler_Novajvojoj_Kuenzli.pdf` . Kontrolita 2017-10-26.

Künzli, Andreas. s.j. Zamenhof – Ido – Tobler. Trovebla ĉe `http://www.planlingvoj.ch/ESPERANTO_ZAMENHOF_Bern.pdf` . Kontrolita 2017-10-26.

Lavarenne, Christian. 2012. *Esperanto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations — aide ou obstacle à la diffusion de la langue ?* Doktora disertaĵo en historio. Parizo: Universitato Parizo 13.

Lins, Ulrich. 2000. *La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo.* Esperanto Documents 36 E. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Lins, Ulrich. 2008. *Utila estas aliĝo.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Lins, Ulrich. 2016. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ esperanto.* Tria eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Martinelli, Perla. 2004. *Edmond Privat. L'uomo e l'opera.* Milano: Centro Italiano di Interlinguistica.

Moch, Gaston. 1906. Jarlibro de "Pacifisto". Unua Jaro. – 30-an de Junio 1906 (= Libraro Pacifisma 4). Parizo: Societo "Pacifisto", pp. 45–53.

Moch, Gaston. 1907. La Societo. *Espero Pacifista* **3**/12, 256.

Mondpaca Esperantista Movado. 1983. *MEM 30 jara.* Budapeŝto: Hungara MEM-Sekcio.

Nilsson, Anna T. 1926. Datoj kaj faktoj pri la paca movado. Traduko el la sveda originalo. Malmö: Eldono de la verkistino.

Prasad, Devi. 2005. *War is a Crime against Humanity: The story of War Resisters' International.* Londono: War Resisters' International.

Privat, Edmond. 1927. *Historio de la lingvo esperanto. Parto 2. La movado 1900–1927*, pp. 95–96. Ferdinand Hirt & Sohn: Lepsiko.

Redaktokomitato de la lernolibro pri komuna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio. 2007. *Historio por malfermi estontecon.* Esperantigita de la Pacamaj Esperantistoj en Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Pekino: Fremdlingva Eldonejo.

Rodríguez, José María. 1996. The Esperantist Movement's humanitarian activities in the two World Wars and its relationship with the International Red Cross. *International Review of the Red Cross*, pp. 312, 315–322.

Simon, Joseph T. 2008. *Augenzeuge. Erinnerungen eines österreichischen Sozialisten. Eine sehr persönliche Zeitgeschichte.* Vieno: LIT.

Tanquist, Reuben A. 1927. *A Study of the Social Psychology of the Diffusion of Esperanto with Special Reference to the English Speaking Peoples.* Disertaĵo M.A., University of Minnesota.

Tuider, Bernhard. 2010. *Alfred Hermann Fried. Pazifist im Ersten Weltkrieg – Illusion und Vision.* Saarbrücken: VDM.

Tuider, Bernhard. 2016a. *Esperanto und Pazifismus vor dem Ersten Weltkrieg.* Forschungsblog, Österreichische Nationalbibliothek. 11/05/2016.

Tuider, Bernhard. 2016b. Alfred H. Frieds Engagement für eine Welthilfssprache und die Esperanto- und Friedensbewegung. **En:** Grünewald, Guido, red. *"Organisiert die Welt!" Der Friedensnobelpreisträger Alfred Hermann Fried (1864–1921) – Leben, Werk und bleibende Impulse*, pp. 159–171. Bremen: Donat.

Tuider, Bernhard. 2017. Esperanto en Aŭstrio ĉirkaŭ la unua mondmilito. **En:** Alcalde & Salguero (2017).

Vivancos, Eduardo. ms. *Mia taglibro (1937–1938) kaj aliaj tekstoj.* Komentitaj kaj tradukitaj de Javier Alcalde. Aperonta en Madrido: SATeH.

Wall, Florence E. 1948. Wilhelm Ostwald. *Journal of Chemical Education* **25**, 2–10.

Zamenhof, L.-L.. 2006. *Mi estas homo.* Kompilitaj kaj komentitaj de Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj.

Javier Alcalde estas doktoro pri politikaj kaj sociaj sciencoj. Li esploris pri pacaj studoj ĉe Internacia Kataluna Instituto por Paco en Barcelono kaj pri sociaj movadoj ĉe Scuola Normale Superiore en Florenco. Li gvidis AIS-kursojn pri lingva justeco (Nitro 2016) kaj pri solidareca agado kun rifuĝintoj (Seulo 2017). Nuntempe li instruas en Universitat Autònoma de Barcelona kaj Universitat Oberta de Catalunya.

*Paperpoŝta adreso de la aŭtoro:* C/Coll i Vehí 141 3r 1a, ES-08026 Barcelona, Hispanio.
*Komputilreta adreso:* ⟨alcalde.javier@gmail.com⟩

Ricevita 2017-10-19
Aldonoj ricevitaj 2017-12-21